

NAJLONKORDA LIRO

POEMOJ, 1987-1991
NICK NICHOLAS

<http://www.opoudjis.net/Poems/najlonkorda.pdf>
Surretigis, 2003

TAMBUREGO-MARŜO	1
RITARO	3
EKDE L' BUŜO	6
FIKSFORMARO	7
HOPKINS HEROLDAS	10
NASKIĜTAGA POEMO: '88	11
GREKA BALO	13
FRUSTRITA MENSU	18
ALARMO	20
JES, TRASUKCESITE!	21
SURVOJE LA FLUGHAVENAJN SENDOGANAĴN VENDEJOJN	22
IOM POST MALSANETO	23
KANZONO	24
KRISTNASKA EVALUO	25
BALADO JARRESUMA	27
KOSMOMENDON	28
EKZEGEZI MONUMENTUMON	30
AMORPOEZIA EKZERCAĴO MODERNECA I	32
SEDIMENTOJ	33
ARMAGEDONO	34
ROND(EL)IRE	35
KIU KLARE ALUDAS	36
EKZERCOJ POR BERT	38
BA!	41
NASKIĜTAGA POEMO: '89	42
HEJMENIRO	44
REORDIĜE	45
TAKSAS VIVON	46
LA MUREGO	47
AL GIGANTO: OMAĜE AL MAHLER	48
AMORPOEZIA EKZERCAĴO MODERNECA II	50
LA NIĈJA LITERATURA REV(U)O	51
PERMARAĴ KANTOJ	55
NOKTURNO	58
EKTUSAS MORTO	59
NASKIĜTAGA POEMO: '90	60
DEK STURMOJ	63
NOTOJ	69

La poemojn ĉi-sube presentatajn verkis inter 1987 kaj 1991 iu mia memo jam de kelka tempo ne plu aktuala; iu kiu alie sentis, alie ritmis, alie fidis, kaj certe alie lingvumis (konsidere ke mi delonge kabeas.) Kelkajn aferojn tiu mia memo diris fuŝe; kelkajn trafe – la kiomon la leganto juĝu. (Eble vi juĝos mapli amare ol mi.) Kvankam mi tiun memon ne plu rekonas, mi publikigas lian postlasaĵaron indulge al ties foresta animo.

Melburno, 2003.

TAMBUREGO-MARŜO

BAM BAM BAM
 alte nun la kapon, nekaŝeme
 marŝu BAM BAM
 marŝu en la novan mondon freŝa
 kaj disŝiru BAM
 EK kaj ŝiru disen bise
 la barilojn praepokajn
 prae mokajn BAM prasufokajn BAM BAM
 gvidu vin laŭ via ritmo
 gvide al la celofino
 jam sen timo
 jam sen timo
 jam sen BAM
 BAM
 BAM

.
 Montru la volonton jam senhonte
 sukcesonte
 fronte – HEJ!
 BAM
 BAM

.
 Ne kaduku, vin konduku
 al la lukto-
 punkto – HA!
 BAM
 BAM
 PUM–

– post la dormo, post la morno,
 sen fanfaro, sen deklaro,
 super foraj grizaj montoj
 lumas ek novtaga brilo,
 kaj el forgesitaj fontoj
 venas forta restabilo,
 kaj la milo
 kaj la milo
 kaj la BAM
 da starantoj flanke
 BAM BAM
 – ili estas kunmarŝontoj;
 jam pro kio

jam pro kio
jam pro kio
IO BAM
alte nun la kapon, nekaŝeme
marŝu, BAM, BAM!

RITARO

I

Feliĉas, kiuj jam la Dion vidis,
 feliĉas, netrafite de dubemo;
 ĉar tiuj (kiujn longe mi priridis)
 ĝojhimnos nun en Nov-Jerusalemo.
 Negravos, se mi diros ke insidis
 ilin minaco pri brul-anatemo:
 ĉi homoj vidis, fidis, kaj decidis;
 por ili foras ĉia dolorĝemo,

dum mi premisojn serĉas poreterne.
 Mi ne kapablus je kredado blinda,
 do certe, jam juĝinte min neinda,
 la Eternulo lasus min infere.

Damnote, tamen kontraŭ la mallum'
 mi luktos, malgraŭtempe, dum kaj dum.

II

Fajrujon portas mi en vian mondon,
 kaj vian mondon fajre mi purigos:
 vi ĉiuj falos antaŭ mia muĝo,
 vi ĉiuj palos antaŭ mia juĝo;
 fajrujon portas mi en vian mondon,
 kaj vian mondon venĝe mi disigos.

*Regis regum rectissimi
 prope est dies domini*

Finiĝas viaj tagoj de malpio;
 pagiĝos baldaŭ ĉiuj viaj ŝuldoj.

*Dies irae et uindictae
 tenebrarum et nebulae*

ardruĝos viaj kulpoj,
 brulos viaj insultoj;
 Finiĝas viaj tagoj de malpio

tonitruorum fortium

la plenumiĝo de la epokoj venas!

*quoque angustiae
mæroris*

Mi amen amen diras al vi amen!
mi alvenis ĵeti fajron sur la teron.
Fajron kaj kolerŝtormojn,
ploron, mornon:
Jenjen la Eternula tago!

*in quo cessabit mulierum
amor et desiderium
hominumque contentio
mundi huius et cupido.*

III

La mondo min ĉiam kontraŭas, ho Dio;
je mia sukceso ĝi spite enuas,
je mia doloro ĝi bruas kaj ĝuas,
je mia pereco ĝi antaŭ-vivuas,
kaj min ĝi senĉese kontraŭas, ho Dio.

La mondo min limas per manĉo, ho Sinjoro;
mi serĉis ekstazon, ĝi donis gajeton,
mi serĉis motivon, ĝi donis ripeton,
mi serĉis transiron, ĝi allasis nur retro-n,
do – retro, kaj paŝe al Vi, ho Sinjoro,

eĉ malgraŭ, ke mi la direkton ne scias;
eĉ malgraŭ, ke mi Vian leĝon ne sekvis;
eĉ malgraŭ, ke eble mi serĉas ne Vin,
mi paŝos almove, al retro al Vi,
al retro al vi, ho Sinjoro;

al retro al la sino Abrahamo, ho Sinjoro.

IV

Vi, kiu gardas la animojn ombriĝintajn,
traktu ilin bone.
Vivinte inferon, maltrafinte beaton,
tiuj trovu almenaŭ

ian ripozon ĉe vi – vi, kiu
gardas la animojn ombriĝintajn.

En vian noktenigran regnon sennuban
tralufoje lumon,
ke la animoj ombriĝintaj moviĝu malplipeze,
eĉ se, malgraŭe, ankoraŭ
senespere, dum mankas espero en via
noktenigra regno sennuba.

Polvigonte nian vivlaboron, finvenkinte,
putrigante ĉiun belon,
kontentiĝu kaj kompatu, Granda Timofonto,
ĉar jam de viaj gardatoj
vi ne plu estas timata, polviginte
ilian vivlaboron, finvenkinte.

V

Mil' da steloj Dion retas
je glasklara noktomez';
dum silenta noktomes'
briletsankto mirmagnetas.

(El gas-amasaj vojoj
voj' poreterne pesapense pripaŝenda videblas
ĝis esperĉes' kaj lumestingo.
Mi paŝas.)

Haltas spiro ĉe Skorpio,
kaj la vidon fiksas Kruco;
ĉiu ajn konstelacio
gloras per Di-reta ĝusto.

Amen pri tio.

EKDE L' BUŜO

La sakro sur la buŝo amatina
belas eĉ pli ol sankta profanaĵo.
Ke gvidas tie lipoj al la ina
vizaĝkapelo kaj korpfluo-templo,
kaj pluen, krom ke sen modest-ŝajnaĵo
tiel ŝi (jarojn daŭru la kontemplo!)

aŭdace montras homon tutehoman,
eĉ homon sub la templaj ŝirm-kurtenoj,
netiman vorti plu ol la Sirenoj:
ĉi tio vekas ĉarmon preternoman,
kaj mi, strangmaniere, fervorsentas
pian sorĉiĝon, kiam la blasfemoj
rubenas, kaj jam super ĵus-matenoj
vortetoj familiaraj firmamentas.

FIKSFORMARO

*(Trioletoj, Tankaoj, Rondaŭo, Epigramoj, Robaĵoj, Tercinoj,
Hajko, Kvintajno, Ĉentono, Stornelo, Gazalo, Rondelo, kaj
Dediĉo, teme pri la nuna mondostato.)*

Mezaĝas la mondo, laŭdire;
ne troi, ne glori, ne riski
ĝi volas, ĉar lace, malmire
mezaĝas la mondo, laŭdire.
Haltetas, enua, vojire,
meditas, ĉu indas ekzisti;
mezaĝas la mondo, laŭdire:
Ne troi. Ne glori. Ne riksi.

Junaĝamonde
"pli ol tridekjarage
pluvivi – honte!"
kantistoj fierkriĉis,
nia generacio.

Samajn kantistojn
malŝpare ni admiras
(jam sen riskemo),
kvindekjarajajn, eĉ pli –
tiel la mond' rondiras.

Nu, prefere retroiro
kaj reven-aspiro
al malnova moro bona:
sonas krio, opona
al diboĉa seks-deliro,

ĉar trodaŭris la zefiro
de karnosopiro,
kaj jam tempas temp' rezona:
nu, prefere...

La libera amor-foiro
eksas, sen suspiro:
pro venero mallongnoma
la epoko kondoma
venis, kiel sav-stabilo.
(Nepre, fere.)

(Temas nur pri degener' senila,
jam pri kiu endas vek-moket' paskvila.)

Oscedo via estas trankvile onda maro,
ebene senpartia – pragmata junularo!
La mondon vi ne ŝanĝos, malvarme do vi pensas
pri la venonta ĝuo. Per ĉeko, ne gitaro.

Miaj ĉi-ĵusaj diroj eble troas;
konstante nia mondo nesenmankas,
kaj ofte neinduloj blag-heroas.

Jes, sed sin trompas tiu, kiu dankas
socion pro senmoviĝemo ĝia;
ĉar ĝi moviĝos fine – kio blankas

nigros, kaj ĉio nunmomente fia
furoros post jardeko: la akcepton
de antaŭaĵoj oni trovos ia

fuŝa misjuĝo – nian mondpercepton
neniu posteulo eternigas,
neble tele-regi la respekton.

Sed gloros tiu, kiu jam instigas
siajn kunfratojn el la propra marĉo,

eĉ se neniom ajn ŝi fanatikas,
eĉ se fiaskas tute lia ŝarĝo.

(Ettempe vivi:
ripozi kaj atendi
ĝis agotempo.)

(Kalmet'
stagnapaca,
kontentpotenca, oj,
komfortkulmina, mezaĝo
monda.)

La celoj ĉie dronis. Jam emerĝas
himeroj por apokalipsa rajdo.
Ni ĝojas sen ĝojo, ni kantas
sen gajo, nek deziron, forgesi
ĉion, tute ĉion,
nin mem eĉ, kaj la tempopason: ĉu ni vivas
en tempo nenifara, vaka?

(Flor' de poemoj:
daŭrade vanigita vivo-amo,
kaj malkontent', kaj filozofiemo.)

Ĉiu sciu kaj agnosku ke, feliĉe,
filozofiemon nutras la ettempoj,
kaj maljuste estas diri, senpardone,
ke nebonigeble putras la ettempoj;
ĉar, dum la enuo, akras la sin-takso,
kaj al la anim' malŝutras la ettempoj:
antaŭ aŭ eĉ post provego viv-konsuma,
komfortige apog-ŝultras la ettempoj.
Kaj jen, je rekomenciĝo de la inter-
-esaj tempoj, dezert-tundros la ettempoj.

Jam jarcenton la homoj, miriade,
pledoplenas, plorplendas, penpenas.
Malfeliĉoj, malbenoj pluvenas,
kaj plupledas ni, penas luktade.

Sed la Grandaj Timegoj degrade
vivkunulas nin longe, nin drenas:
jam jarcenton la homoj, miriade,
pledoplenas, plorplendas, penpenas.

Ni vivtenas nin iom ŝarade,
kaj delonge ni ne ĝojmienas,
ĉar afekti... afekti ĉagrenas.
Ni memoras nin, do: luktis bate
jam jarcenton la Homo, miriade.

Mezaĝas la mondo laŭdire.
Ne domaĝe,
ke malmiraĝe,
ĉar tielas la stato, nu,
ĉar tielas la stato, laŭŝajne.
Ne domaĝe.
Sed kie la perdita naivo?

Neniam tia stato, laŭvere.

HOPKINS HEROLDAS

Hopkins heroldas la dian diron: înskejp' impetas
 per formo malfermita, rim-balasta banal', retro-ribela ritmo.
 Li majstre mastras vorter-arojn; floriĝas, fekunda signo
 efekte efika, ĉiu ĉenero poema. Mi petas,
 ne trojuĝi, postatempe, ard-amon, amaron liajn. Akcentas
 oni strangon, prisuspektas signifon – komence. Sed ligno
 prilaborita krudinte gracias; ankaŭ l' entuziasma enigmo
 Hopkins-a hele klariĝas karige, eĉ tiele: ékstaz-

-krude. Lingvo litota al li nesufiĉis: jam farĉis
 nur-poezia parolo paĝojn trolonge. Diro diecu,
 animluktojn traliki, înskejp' impetos! Novan vidon
 nepre ni gajnas, grandioz-gaman, ĉe tiu. Ĉu do faraĉis,
 ĉar arĉis agackorde? Certe ne! Proteston permesu:
 poezios pli ol klasikbelo; bravo, barakto en zeniton!

NASKIĜTAGA POEMO: '88

Ne multon mi havas pluraporti:
 la abiturienta jaro tro okupis.
 Kaj mi, jam distriĝinte per fervore fuŝaj versoj,
 trovis tutan trankvilon en ekzamena nervozo.
 “Dolĉe Dekses” oni diras,
 sed tion oni ne trovis.
 Ankoraŭ atendente starton,
 intertempe – mi scipovas pli multe
 (mi suspektas: pli mute).
 Sed ne ankoraŭ feras miaj faroj,
 ne fierigas min mia fajro.
 Eĉ se mi plendkrias, ke oni fine surtabligu al mi la mondon,
 kaj donu karnon al miaj elverŝoj,
 adoltonte, mi ne vere pretas adoltiĝi,
 nek oni pretigas.
 Deksep jarojn mi sciis, kion mi konis.
 Nun mi elpaŝas en la stacikorton, kaj tie kvar-kvin kolegoj
 frotas reciproke dorsojn samaĝulinajn.
 (Kompreneble mi envias!
 Mi teorie estas almenaŭ tiel kompetenta.)
 Baldaŭ oni ankaŭ min elĵetos en tian mondorealon,
 en strangan mondon, kiun loĝas virinoj.
 Nu, mi ne volas Prufrock-i,
 sed mi ne deziras eksknabi, damoj, mi ne vere deziras.
 Ne sufiĉas maturo, ne sufiĉas konfido;
 kaj mi ne deziras eksknabi, damoj, mi ne vere deziras.
 Ĉu vi komprenas, kion mi diras?
 Ĉu mi?
 Ĉu entute grave?

 Ĉu naskiĝtage?
 Nu, mi devas decidi,
 min mi eĉ devigas decidi:
 decas malapatii,
 demonstrendas maltimiĝo.
 Kaj iom post iom *estos* maltimiĝo,
 pri tio mi preskaŭ certas.

 Dato estas dato. Ĝi venas, nunas, krizas,
 preterpasas. Mi ankoraŭ starton atendas.
 Intertempe, mi streĉas la nervojn.

Intertempe, mi streĉas la nervojn,
kaj silente atentas.

GREKA BALO

I

Ili ariĝas, miaj saminsulanoj;
sonoras la liuta ritmo
kaj la lira rito,
kaj ili ekdancas.

Ili ekdancas:

La komforta sirtós estas por bonhumorigo;
La para sústa por amindumo forsimbolita;
La militira pidihtós por senintermita spitado;
La senpaŝa rizítikos estas – la Kreto de noblo.
Kaj la brakliga pentozális estas – la noblo de Kreto.
Kaj tiu liro, tiu lido, tiu ludo, tiu liuto
ne havas ĉeson, kaj la raŭkaj voĉfiguroj de la kantanto,
ornamante krudon per potenco,
limon ne trovas;
la simpla, dutakta pulskontinuo estas nura
danco, nura svingiĝo de homspirito,
nura pra-vica akordiĝo.
Kaj je sidiĝo, modalas la ario,
kaj traas, amara, la kadron de analoj pri gloro homa.

Malkomplikas la materialo,
sed el kvar-kvin melodieroj,
liro liuto liuto liro
raŭko distiko danc-rapido rondkant-majesto
teksas tekstas dialektikecas,
kaj mi diras, per insisto
kaj ad-variaci-ado kaj noblovento kaj simpla
kaj per pura dancigo
(tie kuneste dancas per ni kvar jarmiloj),
ĉeson ne havas.

II

Sed Ciftetélis-danco, kontraŭe,
de oriente fontas, fremdĝoje.
Ebrion sensan ĝi mostas fraŭle,
ĝi sugestie sugestas troe.

La sveltulinoj tiel voluptaj
 rotaciigas la ventron, logas
 per la ondadaĵoj leviĝoj ŝultraĵoj,
 incite skuas la mamojn (jonglas),

ke oni certe rimarkas ne plu
 la kelkajn virojn ebriajn sate,
 ekvilibrantaj (inercio nepru!)
 bierbotelojn plenajn surkape.

Do parojn ofte formas virinoj.
 Ne malpli sorĉe ili krurglitas
 kune, pro tio: forestas timoj,
 ĉarmbelas korpoj, talioj niĉas

flanke, kaj tiuj manoradikoj
 delikategaj, sperte plektante
 pri amindumo, kaj tiuj nigroj
 robaj kontraste la blankojn haŭte –

ĉi ĉio – manke de vira helpo –
 estas... ja estas inbelo, nure,
 inda je amo flege, sen kulpo-
 -sentoj, dorlota sensoplezure,

kiu postvivos la majestajn murojn,
 kiu postdaŭros la snobecajn morojn,
 kiu postlasos eĉ pli belajn mirojn.

III

Danc' Kalamatjanós-a
 estas ridet-etosa,
 tute eĉ ne-patosa;
 tre elegante vic'
 paŝas kun fluga glato.
 Longas unua bato
 takte: jen la sekvato
 montras per sving-kapric'
 de la poŝtuko ana-
 -kruzon, kaj ligo mana
 ligas la homojn. Sana
 estas la sentostat'.
 Plaĉas muzikhiat'.
 Malebenetas takt',
 ekvilibriĝa plate.

Danco finiĝas grade.

Fino.

(Distriĝo plade.)

IV

Tangon oni iam tangis
 sange, malgraŭ Kurzens
 ("rideti lace, apatie,
 nek tenton senti, nek deziron.");
 sed nun ("algapi stulte vinoglason")
 postrestis, kvazaŭ eksterglase,
 flegma,
 flegme-ĉi-viskoza paŝ-sinsekvo.
 Takto langvorflua oscedetas;
 mano surtalie, mano ŝultre
 pezas ripozeme, rondmoviĝo
 lacas, trenas sin piedoj malinkline.
 Plenŝtopitas la dancejo, ĝis nemoviĝeble.
 Kaj la kanto, kiu akompanas,
 perdis jam delonge aktualon:
 konsoletas, eĥa, nur gemaljunulojn,
 permemore. Jam maljunas tiu tango.
 Konsoletas nur memoroj kaj la
 paŝsinsekvo. Paŝsinsekvo. Cirklen.
 Paŝsinsekvo. Cirklenpaŝ'. Sinsekvo.

V

*"pri tohuvoĥu' da dada-henoj aŭ da
 skizogonio hebefrenefraŭda
 ĵazkapriola
 modernetika
 maŝinidola
 cibernetika
 grincas la muziko de la sferoj
 neniu oleas la akson de la astroj
 frostiĝis en fridujo artabstrabsoluta
 de la geometrio de l' insul' Laputa
 la bona animala varmo de la vivo
 la mondspegul' rompiĝis
 kaj Melpomenan vundis ĝiaj ruboj
 kaj ŝi elsangas"*

Lajos Tárkony – Haŭtŝanĝe.

La antaŭa moro cedas
 cedas

cececedas
 al la moro nova
 nononova
 nononononova
 la moro nova,
 jen nova.

Nova!
 Mi dancas libere
 kaj disko-muziko
 vibrigas senpere.
 Ja bontrova!
 mi moviĝas fiere;
 je mia ritmado
 mi sentas konkere—

Humoru laŭ l' takt',
 la takt' en la strat'!
 "Vi perfidis min je l' koro,
 kaj traboras min doloro—"
 Oj! Yeah!
 Puls' apogea!
 Korifea!
 Frap-Apogea!
 Interplekto
 kontrapunkt-ritma,
 vi mem respondu
 al damn Haŭtŝanĝe-a:
 skercogonio bebe-matureca
 (ĝuu Hebe-n, Tárkony, estu do apreca!)
 rap-kapriola,
 modernmodetika,
 konfronte sen-idola,
 taktopulse cibernetika—
 la Belo dancas antaŭ vi, Lajos,
 kaj la muziko de la sferoj
 laŭ nova perkut-programilo kirliĝas
 lirliĝas
 kaj se vi fridigis la arton Laputan,
 tio ne min interesas: vi estras kaputan
 sintenon, dum nias la varm' animala,
 la varm' animala, kaj jam Melpomena,
 ŝi—ledan jupon portas, frizo pli konstanta
 ŝin ornamas, estu do apreca!
 Ĉi tiu estas mia muzikaĵo,
 ĝin ne forrabu per kalumnia degno.

Viaj plataj sataj battoj
sekcas eksas ne ampleksas
ĉar tekstteksas kontenuje
krom malĝue.

humoru laŭ l' takt'
la takt' en la strat'

Nova,
mi dancas libere
kaj disko-muziko
vibrigas senpere.

La antaŭa moro cedas
(Puls' apogea)
al la moro
la moro

Nova.

FRUSTRITA MENSŬ

I

postnoktomeze,
 se lite sole,
 danĝere.
 antaŭ ol la dormo kvietigas,
 antaŭ ol la pensa sinsekvo forlulas,
 venas la mortospleno
 silente sola.
 kaj vipe ĝi demandas, kaj vespe ĝi disonancas:

kion vi faris?
 kio vin indigas?
 ho mortemulo, kien vi navigas,
 se la mortfino ĉiam malinstigas?
 kaj vee al vi, al vi vee, animeto;
 kial fieri pri kapablo,
 epokojn difini kaj resumi,
 se apenaŭ eblas, ke vi vivu maljuni
 por postkvindekjara noktiĝo?
 kaj kia estas via eterneco?
 mil jaroj, nur jarmilo
 sufiĉas por forviŝi Beethoven, Shakespeare,
 kaj vin
 el ĉiu monument' kaj kalendaro.
 mil jaroj. kaj poste, nenios al vi.
 animeto, vi scias jam la veron, jam delonge.
 vi. vivas. senresponde.

II

Estas tre facile, ĉu? – eĉ tro facile,
 meti finon al ĉi ĉio. Tia solvo
 evidente popularas niastate.
 Estas tre facile – estas eĉ konsternerne,
 ke homvivo tiel prete pereemas,
 eskapeme; tiel disrompebla.
 Fojfoje, disrompenda de si.

Estas tre facile, ĉu? – eĉ tro facile,
 sin malbapti en Leteo, sin-nulige,
 senpripense, meti finon al ĉi ĉio.

Ne domaĝi plu, pardoni al neniu,
 ne maltrankviliĝi pri la taga kurso,
 tuton perdi, kaj sin mem precipe.
 Sin redoni al la generinta nulo.

(“Aliaj faris, kaj eĉ se revenis...”)

Estas tre facile, ĉu? Fojfoje, fare de si disrompenda.

III

Neniu amas min, neniu min
 respektas, min neniu ajn estimas,
 mi estas nul, neniu, kaj neniu
 min scias, ili konas nur la haŭton.
 Kaj ili – fi! – kaj ili – bas! bastardoj,
 sole rikanas kaj min ĝue mokas,
 nenie vivkunulo aŭ konverso,
 ĉie menspleboj kaj ĉikanoj. Kaj mi
 iliajn vortojn ne parolos, kaj mi
 iliajn kantojn ne aŭskultos, kaj mi
 iliajn ludojn ne dividos, kaj mi
 estos tre sola. Estos tute sola.
 Kaj estos tre malprava.

Tiu malamo ĉiam estis – en mi,
 kaj ili ĉiuj estas nur normalaj;
 Vante, min for de ili izolmemi:
 ilia rondo estas la sola vero,
 ĉio cetera forpereo kun mi.
 Mi sekvu nun. Mi sekvu, sen saĝumi.

Ho mia popolo, mi kion al vi faris?
 Ho mia popolo, mi vin neniam neu.

ALARMO

Atentu, fratoj – marŝas en la stratoj
 la cenzuremaj bandoj, la vervaj fervoristoj:
 minacas jen per siaj nigraj listoj,
 ariĝas kun la torĉoj, per gvat' mandatas batojn

ĉi tiuj, aŭtokrate, pi-aroge.
 Jen marŝas en la stratoj: celas ilia tuto
 dronigi novajn pensojn sen refuto,
 kaj diktatori mondon senscian demagoge.

Ilia nombro multas, multas kreske.
 Kaj mutas ni, malkrede – iliaj voĉoj raŭkas,
 alvoke la moralon, kaj pli laŭtas
 ol ĝusta raciado aŭ justo-pled', groteske.

Rigardas ni, kaj gapas – sed kontraŭi
 al tiuj, oponadi, fariĝas tasko enda.
 Ne temas nur pri ago nin-defenda:
 obstine devas ni ĉi obstinon anstataŭi;

malantaŭ torĉoflamoj pendumilar' pretiĝas.
 Firmu. La lukto daŭre ripetiĝas.

JES, TRASUKCESITE!

La plej malbono por mi malantaŭas.
Min postminaca memkonfido aŭras,
kaj, mire, mi plupaŝas kaj malgraŭas.

La plej malplaĉo al mi – postlasiĝis!
Decidas mi, ke prave min dediĉis,
kaj decas ĝui, kion mi prestiĝis,

post plej penemo. Ĉe mi, ekabortos
denun urĝpremo – vere! – kaj rikoltos
mi tion, kio fine por mi sortos,

kion meritas mi, finlaborinta.
La supro ebenaĵa, malcis-grimpa,
ekcedas subpiede, ĵusatinga;

intecas lukt', forestas bruo cirka,
kaj restas nur kvietoŝirmo mirha.

La plej mallumo estas nur – blankosen', sennigra.

SURVOJE LA FLUGHAVENAJN SENDOGANAJN
VENDEJOJN

KURU KURU KURU
KURU POR AĈETI!
plure krure brue
venis por – aĉeti.

Vortojn ni ne maĉas,
kaj ni hastas preti;
ni ne cele aĉas,
celas ni... aĉ-eti.

Horojn flugis ni kaj pugis
seĝojn ostofikse,
fiksajn kvazaŭ gipse.
Nun ni veku nin kaj eku –

HASTE HASTE DRASTE
POR poŝkalkulilo
POŝmagnetofono
KAJ teknikomilo;

ĈIO laŭtavende,
sed prielspezebla:
Halto dum-transire
jen konvenas... mire!

HURLU ĴUR-UZURU
KURU sen buĝeti!
Ni ne venis peti,
venis ni –
svenis ni –
jenas ni
por aĉeti!

IOM POST MALSANETO

Damnon al vi, malsano-pezo:
tagordon taŭzis vi, furiozo!
Senfaro stagna: viv-rifuzo,
kaj tusotus' – malparadizo;
malsekas, pro veter', Pegazo,
do ankaŭ lin ne trafas paco.

Malsano, nove mi vin spertas,
kaj laŭ kaprico via fartas.
Matene, spleno harde hirtas;
vespere, flegmo min perfortas.
Kaj dume, milde mi jahurtas;
anstataŭ pipri, oscedputras.

Malsano, paneigis vi min prede.
Kaj nun resaniĝinte, postklopode,
kaj nun revigliĝinte, grad-post-grade,
venĝa mi verkas tion ĉi konklude,
ekzorcon, ke pluverku mi konfide,
sen timo pri rekriplobat' insida.

KANZONO

Rigardu al tiom da vivoj
 ĵetitaj trotuaren;
 da homo-restaĵoj marasmaj,
 perdintaj eĉ altaron.

Riproĉu la peno-malŝparon,
 animkonstrui ŝvite,
 por paŝe perei misvoje,
 kaj blagi bravon bride.

“Jam vidis kaj volis, kaj volon konsolis,
 angoris, kaj juĝon kaĵolis —”

Ripetu la sortan gurdaĵon,
 ĝis gudros viaj ostoj:
 neniam evitos vi vanon,
 velkon kaj forgesfroston.

Ribelu, kaj pagu la koston;
 senfaru, kaj suferu.
 Retretu, kaj ree responsu —
 resume: malesperu.

“Mi gutis, mi sputis, perkute mi ŝutis,
 balbutis mi veon — kaj solis.
 Sed vivo vivendas, kaj ĉifas celadon”

kaj ĉifos;
 kaj ĉifos ankaŭ vin.

KRISTNASKA EVALUO

I (Amaskulture)

Ne Jeŝua ben Josef naskiĝas ĉi tie.
 Sed Kristnaskaj arboj
 Kristnaskaj rabatoj
 Kristnaskaj falsaj neĝoj
 Kristnaskaj sanktaj Nikolaoj
 Kristnaskaj rostitaj meleagroj
 Kristnaskaj donac-trudpetoj
 kaj oni ne forgesu: Kristnaskaj televidprezentoj,
 en kiuj la bonvola Kalifornia bild-imperia k-io
 inundas mondon akcepteman,
 post malmultaj respekteme neofendaj
 aludetoj pri ia Palestina mirbebo,
 per:
 sukereco, sekureco, k malskeptikeco
 (kontraŭ kelka tantiemo)
 krom la promeso pri unutaga mondharmonio
 la benaro de ĉiu atingebla postenulo
 kaj la averto ke

neniu
 neniam
 neniele
 neniagrade
 nenial aŭdacu moki la festan ferieventon
 je puno de venĝo far tri Kristnaskaj fantomoj
 el milfoje remuldata Dickens-novelo.

Post kelkaj bel-intencaj vortoj,
 ankaŭ tiu tago pasas.

II (Eklezie)

En Betlehem' naskiĝis iam bebo;
 kaj kvankam lin atendis tasko grava,
 naskiĝis li senbrue, en la plebo
 (malgraŭ ke Davidido) kaj senhava.

Estis kvieta nokto, freŝa tero,
 ripoza roso kaj domaro paca –
 saturas ĉion amo al eterno,
 karesas ĉion savpromeso gracia.

Kvieta nokto volvis dankopreĝojn.
 Domaĝe, ke ĝin superbruis lumoj,
 anĝel-motetoj, Steloj de Tri Reĝoj,
 kaj ĵurnalistoj kaj fotilaj zumoj.

Ĉirkaŭ la trogo ariĝis niaj krudoj,
 ne lasis lokon eĉ por la ŝafidoj.

III

Ĉu Jeŝua ben Josef naskiĝis ĉi tie?
 Kion mi diru, sinjoro? Multaj beboj naskiĝas ĉi-tage,
 kaj mi ne povas nombri ĉiun estontan bubon por via plaĉo.
 Mi havas alian okupon, sinjoro. Restas pluraj kotnazuloj
 ekstermendaj,
 kaj malsufiĉas tempo, por ekstermadon ĝui. Bondezirojn?
 Bondeziroj ne kuiras kaĉon.
 Sarkojn sango sanigas.
 Inter lupoj, lupe krii.
Gloria... Plejaltaj gloras, ĉiam. Ni – havas okupon.
Et in terra pax. Certe!
 Kiam ni jam antaŭe ekstermos la lastan kotnazulon.
 Kion? Inter homoj estu bona volo? Kion mi volas, tio bonas. Parolite,
 finite!
 (Nu, vi ne daŭre min agacos, ĉu, sinjora moŝto?
 Tiel mi opinias.)
 Bele. Post unu semajno, nova jaro, laŭ vi. Egale.
 Nova jaro, sama mondo.
 Kaj tiun mondon mi iom scipovas elpremi,
 tion kredu. Kompatemo? Humaneco? Ne *min* ridigu.
 Se vi havos potencon, ankaŭ vi forgesos sloganojn,
 kaj atentos nur la substancon. Kaj kio estas la substanco?
 Brava demando. Ke tiu, kiu povas suferigi, faras.
 Kaj tiu, kiun oni suferigas, sanktuliĝas.
 Parolite, finite! Mi ne restos ĉi tie por via festomanĝo.
 Por iu ajn festomaĉo. Mi havas alispecan matĉon.
 Mi diris: mi havas okupon. B' nokton.

Post kelkaj rompitaĵoj,
 ankaŭ tiuj vivoj pasionas.

BALADO JARRESUMA

La lasta tago de nelasta jaro.
 Sin iam freŝa jaro tede finas.
 Kaj la komence plena kalendaro
 oscedas, dum ĝin ekso eliminias.
 La vivo, kiel ĉiam, vivrutinas,
 kaj se la jarcifero parvenue
 aspektas pro ĵuseco, tamen plue
 erodos ĝin la tempoflua certo.
 Do ĉio ordas bone kaj kongrue:
 Nenio nova, krom malnova sperto.

Ne dubu, ke daŭrados ordinaro:
 kiu esperas ŝanĝon, halucinas.
 Onia kontenteta dankfanfaro
 hodiaŭ do dampite fest-obstinas.
 Aplaudu bis, se io ajn kulminas —
 kaj ĝise, ni plu distru nin vivue;
 kial ne? Ni kontentas. Evolue
 form' falis — identigis nin inerto,
 kaj nin malpereigis. Ŝtonstatue!
 Nenio novas, kaj malnovas sperto.

Ne ĉiun fakton foldas inventaro?
 Ne ĉiun veron scio determinas?
 Vanos la ĉioscio-akaparo,
 ĉar ĉiosciulon kia Di' difinas?
 Ne tutas scio, sed mi tutdestinas,
 ĉar konas la ekzistostatojn de frue,
 kiel tretitajn stratojn, nefluktue,
 ĉiom. Soldat', logita de dizerto,
 antaŭ ol li reiras monddetruo:
 Nenio nova. Krom malnova sperto.

La tero staras, ĉirkaŭrivolue,
 kaj rotacie, restas samsitue.
 Princo, ne postuliĝas troa lerto
 trovi konkludon ja (eĉ se netuje):
 ne ion novan; sed malnovan sperton.

KOSMOMENDON

Do laŭ mia mendo, kreu vi kosmeton.
Mi je vi konfidas; ĉiu laŭdas alte
meti-sperton vian – fidu mi enketon.

Tamen atenteme zorgu viaparte
sekvi, kion jene mi respecifikos:
mia universo, personeca ĉarte,

min ne embarasu (eĉ se ĝi ne ŝikos)
antaŭ la diaro. Bone? Ĉion pravan:
arte ĝi senmankos, spece ĝi unikos.

Jes. Mi universon mendas – ete ravan,
(Nu? Malgraŭe, riĉos via rekompenco,
mi fondusojn havas!) ravan kaj konkavan,

kun la galaksioj en kutima denso
kaj la dimensioj ne absurde grandaj;
por ke ĝi juvele iĝu precedenco

por la kosmoreĝoj kaj vicdijoj dandaj.
Tial mi ordonas: Belon dise ŝutu,
ŝparu pri nenio – estu ja komandaj

pri buĝeto mia, eĉ ne pridiskutu!
Frunto devas alti, fronte la fruntaron
sampostenan, ĉu ne? Nu, ni absolutu.

Plue: vivprovizu (faru ne eraron!)
mian universon je malgrandaj nombroj,
sed sufiĉe grandaj, ke mi ĝuu flaron

de glorig' far ili – obeemaj ombroj!
Kaj necesaj: kial die ni oficus,
se al ni ne preĝus kelkmil stultaj skombroj?

Sed por gardi plaĉon, eĉ vi gardpolicus.
Ende: ne vekigu regatulaj streboj –
Ili ne ribelu ial ajn; ĉu licus?!

Do: ilian mondon muru flamoŝveboj,
baru glav-anĝeloj ĉiun spit-ekskurson.
Fermu ilin ene, kiel se amebajn.

Do: determinismu preterriske kurson:
po dekkelkaj ju-oj por "des" unuopa.
Tio eliminis ĉian ajn konkurson.

Kaj se plu la vermoj (bravo teleskopa!)
levos la okulojn stelen, renegate,
Do: punplagu ilin; hajlu ĉion-ŝtopa

belo brilo bono, ĝojo miriade.
Mi certigas: se vi ilin kontentigos,
pli stumbligis tio, ol eksterm' Goljate.

Jes. Mi vin revidos, kiam vi kompletigos.

EKZEGEZI MONUMENTUMON

*Exegi monumentum aere perennius
regalique situ pyramidum amplius
quod non imber edax non aquilo impotens
possit diruere aut innumerabilis
annorum series et fuga temporum.*

– Q. Horatius Flaccus.

Ekzegezi monumentumon aere, per enuig',
regalas cite nur profesorojn ampleksasciajn,
kiuj imperiestras libr-akveduktojn impotentajn,
posede de reputaci'. Numereblas tiu
anaro serioza dum malpli ol fuĝo tempa.

Ĉiuj aliaj, se legas, nur foje kredas,
ke lokalizis perlon hurle sagacan
(aŭ tre rare, eĉ saĝacan.)
Post tio, ili kontentas ĝui la formotrukojn,
kaj kunridi la lertetan ĉarlatanon,
kies produkton ili foliumas.

Tiaspirite
ofertas mi al kelkcentnombra publiko
jenajn kaj ĉi-suprajn spekulajojn.
Indulgu, mi petas, ĉar mi estas esence neaŭdaca knabo,
kun sola malbela kutimo, ke sporade elĵetas versarojn.
Ĉar foje mi volas profundigi,
kaj eĉ se ne sukcesas, mi pardonpete avertu, ke

Mi ne enhavigis tiom.
Pardonu. Nur artaĵon mi celis krei,
ne ŝanĝi ies vivon;
nur distri la vortomondon,
per konservativaj piroteknikoj.
Sed vere, tiom diri, mi ne celis,
celis nur tiom ritme balbuti.

Kaj se malgraŭe,
se malgraŭvole naskiĝis io bona —
nu, naskiĝis. Mi ne respondecu:
tian riskon enterprenas la kreisto,
tian laŭdon, tian kulpon.
Se iu faraĵo brilas pli ol intencite,
sciu, ke nenion tian mi intencis,

ke malon mi intencis, ke mi volis
nur komforton submez kvalitecan.

Vi tolere biletpagis.

Nun finbabilas la folulo finalrolon,
do lasu foriri! Ne retenu,
li ludas kun fajro kiu ludemas lafe.

Kaj li

preparadas zorgeme, arbitre, aŭdace,
kun pripens' mekanika la malnetojn.
Tiuj poste elvenas la fornon, krude figuritaj,
argilmuldende. Ĉizas kaj ĉizetas,
lasas malmoliĝi; kiam tedigas plulaboro,
(aŭ ne plu ripareblas la malfeliĉaĵo)
li tiujn forpuŝas en la mondon.

De tiam, la idoj ne interesas la patron,
kaj la idar-studentoj ne interesiĝu pri la patro:
temperamenta, malsociema, krudmotiva, foje frenezeta,
tiu diris, miris, kaj foriris – ĝerminte.
Se ĝermon kultivos, evitu ĝerminto-kulton,
ĝi ne diros pli, ol diros la fruktoj,
kiujn mem vi rikoltos,
temptempinte.

Kaj se tiuj transvados la malbonajn jarojn,
ne demandu, kial tiu fuŝdiris nespertajn banalaĵojn,
sed ridetu pri iama Alcuin, blankabarba, bieron-baa,
kaj pripreĝu lian fandiĝintan animon.

AMORPOEZIA EKZERCAĴO MODERNECA I

Mi povus ditirambi la ĝuojn de amoro –
vi scias kiajn. Kisojn, emon al noktoj ludaj,
viskozan moviĝadon de korpoj ĝoje nudaj –
kaj tiel plu, kaj plue, mi kantus kun fervoro.

Facile, ke mi himnu pri bela senpudoro,
pri ideala sekso, sena je sentoj krudaj,
ĉar kredus mi, ke fontas el amoj plej profundaj
ĉi tuta karuselo de kaco kaj klitorio.

Tiel mi volus kanti; sed mi ĉirkaŭrigardas:
geviroj sur parkbenkoj ŝaltofacile ardas;
lertaĉaj reklamistoj vendegas per dekolto;
en la vitrinoj vicas enuaj midzistinoj.
Tiel malmulte kostas, tiel malkaras korpo,
ke ĝi, anstataŭ kantojn, meritas – disciplinojn.

SEDIMENTOJ

Horo alvenas kaj jaro foriras.
 Tempo kuras. Tempo stiras
 ĉiam antaŭen, senĉese pela.
 Nokton trompas tago ribela,
 orde efemera.

Kio travivas la maljustajn tempojn?
 Nur la necertaj konjektoj,
 nur la starpunktoj ŝancelemaj,
 sole la senbazaj aspiroj,
 kaj multaj duboj.

Vivoj forfulmas, pereas ideoj.
 "Pro"-oj mankas, multas "se"-oj.
 Neniu konas eĉ siajn praavojn.
 Dungas tempo devajn sklavojn,
 (nin,) ĝis epitafoj.

Kio postrestas transŝanĝojn epokajn?
 Scio ne, sed suspekto;
 vero ne, sed diveno;
 sukceso ne sen fiasko,
 kaj mutaj dupoj.

Kio kontinuas en tempesto?
 Kio glaciigas dum degelo?
 Se as nune, kie la is-esto?
 Se ni tempas, kia la tempcelo?
 Estintecon mi ne povas palpi,
 estonteco min ne povas helpi.
 Ne ekzistas daŭro, sed ekhaltoj;
 haltoj stumble sekvas post la startoj.

Horo alvenas kaj jaro foriras;
 certon potempe ni malakiras.
 Fluas temp' (laŭ sia kodo),
 demetante tempokoton.

Kio valoras en tempa sedimento?
 Malgraŭa vivo, spita alstrebo.
 Kio sedimentas el flus' kosmogonia?
 Ŝaŭmo ŝanca, ŝvebo ŝtorma,
 ŝlim' maltrankvila...

ARMAGEDONO

Ni ĉiuj kutimece plonĝadis tra la tagoj,
 kaj nokte ni nin distris, kaj dormis. Forpasonte,
 ni ne tro ĝenis nin per demandoj aŭ reagoj,
 aŭdante flustrajn famojn; prudente, nekonfronte.
 Sed famoj plilaŭtiĝis. Mi ekscivolis sonde,
 enketis, malĝojetis, rezignis fine. Iras
 la mondo siafinen, kaj ni – ni ne esperas.

La tagoj tagojn sekvis. La tagoj sin resumis.
 Venis mateno, kiam ni vidis elfenestre,
 (kaj ni, eldomiĝinte, domaĝe okulumis,)
 ke nigran sunon naskas la nigraj montoj dekstre,
 en nigra ĉielvasto; ŝaktas ĉiel' penetre.
 Kaj gapis ni al supre horon pli ol kutime;
 komprenis, ke la fino masivas jam proksime.

Jarmiloj da Kasandroj, funebroj far epokoj,
 por tiu ĉi tagiĝo! Honoro neŝatata
 al ni sin trudis. Tion akceptas ni, sen ŝokoj
 (krom ŝokoj en Hadeso); Tempo fariĝas sata,
 ĉe ni ĝi nun ĉesiĝas. Egale. Jam senkvanta
 priploro, diluvonta hodiaŭ, ellarmiĝis
 de miloj da profetoj; proe ni malarmiĝis

antaŭ la damnoveno nesurpriza. Ni vete
 je sorto konkursadis; la vetoj nun pagendas,
 do nun pagotas de ni. Ni ne protestos, pete,
 ĉar ne petpovas; pagos ni, kiel jam brokantis
 niaj prapatroj kulpon. La mondo sin disfandas,
 ni ne propekan kapron ekserĉos. Kun "amen"-o,
 ni iris – laborejen. Malkontraŭ la malbeno.

Ni ĉiuj kutimece plonĝadis tra viv-seno.

ROND(EL)IRE

Mi ne povas ĉion fari,
do – mi skribas, ĉiam sole.
Ofte emas mi erari,
kaj mi pravas nur nevole.

Mi scivolis, sin-kontrole,
ĉu do eblas sent-najbari
al aliuj verke; fole!
Mi ne povas *ĉion* fari!

Miojn dise devas bari
spert-diversoj, spit-izole.
Kiel mensojn akapari?
Do mi skribas ĉiam sole;

ne aŭdacos hiperbole
mi komunon venkdeklari
kun la miloj, (eĉ se, skole,
ofte emas mi erari)

ĉar finrajtas mi elstari
nur laŭ mi, kaj nur frivole.
Tiu pravo devas klari –
kaj mi pravas nur nevole.

Mi kapablas vitriole
pri ĉi tia sort' amari.
Sed renversi ĝin petole
kaj blageme populari

mi ne povas.

KIU KLARE ALUDAS

*Neniu homo estas insulo, kompleta en si mem;
 ĉiu homo estas parto de la kontinento, parto de la
 ĉeftero. Se la maro forlavas bulon, Eŭropo estas
 pli malgranda, kvazaŭ promontoro malaperus,
 kvazaŭ domo de viaj amikoj aŭ de vi mem; la
 morto de kiu ajn min malgrandigas, ĉar mi
 estas parto de la homaro; sekve, ne demandu pri
 kiu mortsonoras; oni sonorigas pro vi.*

– John Donne.

Ho, potenculoj falegas,
 eĉ dum ili popolon pistas
 tanke, kaj fajron sur homojn sagas,
 kaj venĝe teroron insistas.

Ili tamen falas,
 kaj falas tre profunden, ruine;
 punpagas, pro ke antaŭe patrolis
 mensojn; juĝiĝas fine.

Mortis.

Kuraĝu, homoj, vi kuraĝos!
 Neniel feras ilia volo.
 Antaŭ hommuro ili fuĝos,
 fuĝos antaŭ popolo.

Elmortis.

Li kuŝas tie, sangolinio en defluilon.
 Kial? Vorteble, vortu, vortu,
 sed ne malfareble.

Kaj eĉ falante, ili
 plu vidas nenion tra la fenestro,
 en la balkono insistas roli
 amatan popolestron.

Ne malfareble,
 li kuŝas sub nebulo de larmigogaso,
 disiĝanta pro maŝinpafilaj ekkrakoj;
 policanoj preterkuras kun bastonoj,
 ĵurnalistoj kaŝfilmas
 lin, solan en la placo.
 Li ne leviĝos.

Ho, potenculoj falegas,
eĉ dum ili animojn turmentas
karcere, maljuston sur homojn plagas;
eĉ dum homaro lamentas.

Li ne leviĝos.
Kugloj haltigis la demonstracion. Lin memoru.
Vi scias, pri kie mi parolas.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

Ho, potenculoj falegos.

EKZERCOJ POR BERT

I

Se mi mortos morgaŭ,
 se mi mortos – mortos morgaŭ,
 vi laŭvole min funebru.
 Mi ne volas, ke vi febru
 ploron por mi, pro la zorg' aŭ
 timo, ke mi mortos morgaŭ.

Se mi morgaŭ mortos,
 se mi mortos – morgaŭ mortos,
 pensu pri mi kun indulgo.
 Vian frunton kolersulko
 ne makulu. Vi adoltos.
 Fortu, se mi morgaŭ mortos.

Kaj se morgaŭ
 disipiĝos mi, se
 morgaŭ ĉesos vivi mi, tre
 sensignife, ĉar ĉi mondo
 ne plu gravos
 do nen io
 vere gravos as
 mort kompren-eble
 metas finon
 al iom
 nefruktuiĝo
 k cetere v scias
 lumo
 koŝmo
 spir(it)
 porĉiama ripozo kaj
 pasas en objektivecon de la nevivaj
 kien eĥas
 min ne eksedzigu, pro dio!
 vi manĝis tutan la spinacon? Jen bona infano!
 refoje vi malsufiĉe studis: 6 el 10.
 kaj kiam mi iris al la milito...
 la ĉefo deziras vin intervjui morgaŭ je la 10-a
 la ĉefo morgaŭ deziras
 la ĉefo morgaŭ
 la Ĉefa morgaŭ

kaj
 morgaŭ (vi revenos? vi revenos?)
 mi revemas, ĉu mi morgaŭ,
 se mi disipiĝos morgaŭ,
 krom se morgaŭ
 ĉesos;

Se mi morgaŭ eble,
 se mi mortos morgaŭ – eble –
 min ne tuj forgesu, kara.
 Funebremo kvaronjara
 ne (tro) trous, ĉar funebre
 mi vin lasos – morgaŭ, eble.

Sed se mi neniiĝos,
 se hodiaŭ neniiĝos,
 ba! vian tagordon spektroj
 ne influu, (oj, konjektoj!)
 ĉar la rememor' vertiĝos,
 se mi tiam –
 mortos.

II

Komikas
 nia –
 komika
 (ha!)
 nia
 specio
 –ĉu?
 amuza!
 Jes, nu...

“Ilin detruu. Ilin
 ĉiujn detruu. Purigu
 ilin per fajro!”
 Komike,
 ĉu? (hihi) Sed
 kion vi diras?
 ne tro gra-
 gravas nia raso-homamaso, ĉar
 surekranigi min vi ja kapablus,

mi ne pridubas. Povas vi programi
 mian cerbaĉon en poŝkalkulilon.
 Kaj kial plendi prie? Jam humilon

scipovas mi sufiĉe por – aklami:
 Brave, plu lertu: kial gravas homi?
 Aŭskultu ĉirkaŭ vi: bebet-babilojn,
 patrin-ridetojn, lernejan-paskvilon,
 nin klaĉajn. Ĉiujn ĉi vi povas damni,
 damni per fajro, ĉar ni estas etaj;
 ni ne aŭdacas pensi, tre pasivas,
 apenaŭ scias, kial ajn ni vivas.
 Jes, damnu nin, ĉar pikoj bajonetaj
 nin ne ekvekis de torporo nia,
 kaj fine vekos nin nur –

he?

mia aŭskultantaro ekDORMIS?

ve, ve, specio,
 ĉar temas pri
 efektive amu-
 komiKA

specio, ĉu?

Jes, nu,

“Ĉu iu iam hazarde

menciis al

vi ke vi

estas tre stranga?”

“Memorigadu al mi, ke mi
 denun ne sidos apud vi.”

kaj plue,

“Ne, ŝi opinias, ke

vi vin opinias kleraĉa”,

pro kio

pseŭdolerte mi iom de-

voj-

iĝas,

krom peti, ke vi vidu ke

temas ja pri –

(...Kion vi diris?)

komika,

komika,

komika (ha!)

speco de

spe-

ci

-o

!

(

BA!

Mi estas nur malplena homoŝelo.
 Kaj kiam tiu ŝelo ekparolas,
 pafŝercas, ridas, krude mispetolas –
 ne tro atentu, ĉar pri ŝelo temas,
 pri nur malplena, pri penrevema ŝelo.

Mi estas nur filistro ĝoja boje,
 tre laŭta, jes, aroga, jes, ĉagrena,
 jes; ne tro sociema, iom sena
 je... multe. Nekoninda malgajnulo –
 tiel mi aŭdas. Min laŭdas nur mi, foje.

Mi estas ankaŭ temo de hazardaj
 konversoj aŭdiĝantaj tra la muroj.
 Kolero flusas; poste, sakro-pluroj
 nevertitaj. Nescion mi ŝajnigas
 (ne malfacila!) pri la insultoj hardaj.

Mi krome estas ĉiufare fuŝa:
 nenio mia ĝisas kompletigon.
 Mi ankaŭ estas nulo, kaj prestiĝon
 mi havas tiom, kiom somere muŝo.

Kaj mi ne estas ajne malpli ol vi.
 Ni ĉiuj same tiel devas polvi,
 kiam la rond', la mond' – amas moke korvi,
 krueli – eĉ *por* vi!

NASKIĜTAGA POEMO: '89

La subskribinto, atinginte plenaĝiĝon,
sentis nebulecan kaj nepravigeblan malkontenton,
pretekstante, ke ricevis malsufiĉe da amoro,
tro da okupateco por ŝati aksioman algebron,
kaj por skribi poemojn – malakriĝintan ĝuosenton.
Kvankam li citas tiujn kaŭzojn ofte,
li ankoraŭ malkontentas eĉ pri tiaj pretekstoj,
sed konsoliĝas parte, ke almenaŭ tiu malkontento al li propras,
malsame al kelkaj, kiuj alprenas alies kontentecon.

Ili vivas por fiki, ili vivas por muziki;
ili vivas por drinki, vivas por retoriki.
Vivas mi ĉar – kial ne?
Jes, trafite. Ĉar kial ne,
kaj ĉar – damne! Oni foje povas ridi!

Krome okazas, ke la subskribinto ne antaŭenvidas hele,
ĉar tre subite trovis, ke ekzistas dungiteco,
kaj okupiĝo de la horo naŭa ĝis la kvina,
kio ne tre harmonias kun liaj planoj pri famiĝo –

Kiel fascine! Tagoj, laboro, tagoj,
laboro, noktoj, laboro, televido, dormo,
laboro, tagiĝo, veturado, laboro, tagoj, laboro,
lunĉo, laboro, laboro. Mi ĉirkaŭiras ridege,
provas konvinkiĝi, ke io/ĉio estas amuza.

– kaj ĉar neniam tre sociema, akuzas la kolegojn pro la malfeliĉo:

Flanke la malmultaj atentantoj grimacas,
opinias min stulta, ĉar nekonforma;
fuŝa, ĉar provema; naiva, ĉar bonvola;
ne ilian modelon laŭanta, mi pereu!
(Nu, pereu do mi, se tio ĉesigos la klaĉon.)

Kompreneble tia neracia paranojo ne eksterordinaras,
sed konvenas, ke oni ĝin regu, antaŭ ol fariĝi
tute nekapabla ani al homaro.
Kaj pri tio li iom dubas:

Ĉu mi ne adekvatas?
Ĉu mi ne ĝustavojas?
Ĉu mi ne enretiĝas komforte en homaron?

Kion mi sciu, kion rajtu, kion gaju,
se ne certemas?)

Ne trovinte respondon en la stratomezo,
(aŭ en broŝuro de la Internaciaj Socialistoj,
li, iom konfuzita, malakurata, misdormanta,
skribas al si ĉi-ĵusan memornoton,
plia etaĝo en meze longa vojo.
Du-tri "Feliĉan naskiĝtagon, Niĉjo! Vi kiom aĝas – trijara?",
kaj plu – al la afero. Homo estas esence sola,
homo ne povas transkomuniki sion,
homo festas sian naskiĝtagon
mallaŭte.

Petole, tempo sablas
elmanen. Rendevue
al sekvantjare!

HEJMENIRO

Mi la kapon klinos,
 mi sur vian ŝultron;
 la hararojn merĝos.
 Al vi mi estos – kion vi deziros.
 Diru sole, ke ĉe vi, mi estos
 hejme,

hejme. Oj, mi longe iras,
 longe antaŭ pordojn fermitajn.
 Iras mi rekte jarojn,
 samajn irejojn hezitajn.
 Mi timas, plori ne plu povas.
 Samaj irejoj malnovas.

La pika preskaŭeco en amo...

ĝi min silentigos. Vi kvietigu min.
 Vi ŝirmu min de la ululaj ŝtormoj.
 Vi tegu min disde angoroj frostaj.
 Nemulton ja afablu. Momentan haltigon,
 iom da animvarmo. Kelkan sentempecon.

Se vi volas. Almenaŭ al mi
 hejmu. Hejmu ja, Kara; hejmu.

Mi la brakon donos,
 mi en via mano;
 ni kunos, pli ol sense.
 Al vi mi estos – kion vi deziras.
 Lasu sole, ke ĉe vi, mi estu
 hejme,
 hejme.

REORDIĜE

Mi vagis for de formo longajn horojn,
ne aŭdis domen-vokon de Patrino.
Fascinis lud-senfino; la furorojn
mi ĵetis-kaptis pilke, kun obstino.

Mi devis fari tiom da esploroj—
kaj tiel urĝe—ke al la rutino
mi malomaĝis; mokis mi rigorojn:
“Necesas pli efeko, ol rafino!”

Sed foje sorĉas io pli perfekta.
Ĉu beloprav', ĉu seko intelekta?
Nenio misas en sonetomondo,

kien mi foje vagas; ne facile
(al mi la formo spitas), sed azile.

Densiĝas strofoj en la horizonto.

TAKSAS VIVON

Taktas jarojn tiuj, kiuj dankas
Dion – trance, kun vagstulta fido.
Trafas kraŝon tiuj, kiuj tranĉas
por si hastan vojon – kun venkrido.

Tanĝas homojn tiuj, kiuj talpas
mensizole, ĉar en *si* kontentas.
Transas homojn tiuj, kiuj drakas
homestrante, ĉar laŭ *si* potencas.

Taksas vivon tiuj, kiuj taskas,
je pasumo de jaraĉoj dorme.
Miliardoj vojas kaj fiaskas,
sin-malŝpare, por malvivi morne.

Foja korpo pli ol ni meritas,
ke pluvivu: tiun ni ŝtonumas,
kaj pluvivas mem ĝis preteritas.
Super niaj tomboj, tagoj lumas

sen ni. Tial traktas la drastantoj vivon,
kiel aviadonto aŭtobus-tarifon.

LA MUREGO

*"Miojn ĉiam devas bari
spert-diversoj, spit-izole."*

Mi ne memoras kiam
stariĝis la Murego;
ekde memorkomenco jam ĝi staris,
hake la sunon baris.
Nin ŝarĝis ĝia ombro.
Esper' eksteren tre malpermesende.

Do nia jun-aplombo
protestis mesaĝsende:
sur la betonon hele ni grafitis
ridetojn kaj parafojn,
piroteknikopafojn;
la mondo nur ĉi tiaj nin ekvidis -

kaj nin ni konatigis.
Sed ni mensogis bilde,
ni surŝtonigis sentojn nur frivolajn.
La verajn sentojn ŝilde
nia Mureg' enfermis.
Kiel nin konu iu ajn, dissolajn?

Tamen, ĉar ne pacemis,
ni revis planojn folajn,
sopiris vidi en alies korton.
Eĉ se ĝi tute samus
al nia, jam ne vanus:
jam ni preterus sion, sio-bordon...

AL GIGANTO: OMAĜE AL MAHLER

Malgrasa judo aŭtokrata,
 kun miopio kaj pudoro;
 juna edzino ne seks-sata;
 posteno alta, kun honoro
 (sed, domaĝinde, ne favoro);
 somere verkis li - ne gemojn,
 jam mondevastis la laboro:
 li vere kreis kosmoskemojn.

Komplezi per nestrebo glata
 al rigidema gust-doktoro
 ne celis li - ĉar delikata
 ne povas esti mondangoro,
 kaj ne brideblas venkoglora.
 Ne volis malpliecajn temojn,
 li temis plejon, kun stentoro;
 tiel li kreis kosmoskemojn:

herooj kaj renask' beata,
 Pan, infaneca fidfervoro,
 funebro ĝojen kordilata,
 kaj tragedie ŝira ploro,
 gajo, jubilo kaj adoro,
 ekdubo fronte mortproblemojn,
 kaj fine pac' post vivhororo:
 li jam finkreis kosmoskemojn.

La kritikado - senkompata
 ("Jen superfluas tiu ĥoro!");
 kaj pro la sort' trifoje bata,
 marasmis fine lia koro.
 Li entombiĝis sub marmoro.
 Ne surskribigis li poemojn,
 ĉar ne necesis pridekoro:
 li vere kreis kosmoskemojn.

Veron li verkis, laŭreata
 al nia temp' kaj nia moro.
 Patosis li, aŭtoritata
 pri homaj sento kaj doloro.
 Obsedis lin anim-esploro
 totala: paŭsis niajn memojn,

kaj per rezulta malrigoro
sincere kreis kosmoskemojn.

Hieraŭ estis ignorata –
hodiaŭ trovas lin furoro,
kaj morgaŭ... nu, laŭdado flata
utilas sole al retoro.
Sed li, delonge jam vapore,
per verko tiajn sent-ekstrecojn
dum unu kaj duona horo
kaŭzas... ĉar kreis kosmoskemojn.

Princ' Gustav! Kara Direktoro!
Mi ne scipovas rekviemojn,
sufiĉu do ĉi metaforo:
Vi vere kreis kosmoskemojn.

AMORPOEZIA EKZERCAĴO MODERNECA II

Kelkaj amemas kvazaŭ finiĝus jam la mondo;
aliaj, kiel se ili poreterne vivas.
Kelkaj la karnon amas. Aliaj – laŭ renkonto.
Kaj estas kelkaj, kiuj neniam eksnaivas.

Ekzistas amo vora, kaj amo sen respondo,
krom amo blinda; amo, kiu pli malaktivigas
ol amo forgesita. Kaj amo per konfronto,
kaj kaŝa amo, kiu pudoras – aŭ lascivas.

Krome ekzistas amo, la lernejana ludo,
ĉe kiu oni sidas sur la parul-genuoj,
videble ŝmacas, ĵuras – kaj tiaj plu fuŝĝuoj.

Ĉe mi, la amo venas kiel malŝata trudo;
ĝi ne svatludos, ridos, etos. Ĝi absolutas,
ĝi celas neniiĝon. Kaj ĝi prefere mutas.

LA NIĈJA LITERATURA REV(U)O

I

Vilanelo Makarona.

(La lingvon mi muldas, ne bakas.)

Klikanoj kun lingvopraktika strabo,
vin kiuj for de realeco turas,
jen *pedicabo vos et irrumabo!*

Praganoj, vin minacas mi per frapo,
nam cij fuŝstiles ak baj spraho skuras –
klikanoj kun lingvopraktika strabo.

Kaj vin, adeptojn de pedantopapo,
nin katenuntaj, ĉar vi *tiom* puras:
tuj *pedicabo vos et irrumabo!*

Eĉ vin, Kálmán, ŝatendan per mirgapo,
riproĉu mi; via taktik' aŭguras
klikanojn, kun lingvopraktika strabo.

Vin krome, kiuj plu per goja kapo
pensas, ke Esperanto malkuturas:
fi! *pedicabo vos et irrumabo.*

*Nam caram linguam firme segregabo
præter quos verba noscunt hau per gulas:
klikanojn kun lingvopraktika strabo
midzigos mi, kaj bugros mi – per klabo!*

II

Jupanaskoj

Vetero pluva.
Jen hajko... fuŝiĝinta –
struktur' sinpruva.

Nuboj kaj duboj.
Hajkojn mi ne kapablas!
Bas rimoruboj...

Ĉiel' reblue.
Meteo akaparas
hajkon. Kongrue!

(...ĉi rimo kejlis!...)
Hajklande nun mezvintras.
Ĉe mi ĵus hajlis.

Mi hajkojn "verkas".
Indigne nokto kraŝas,
mallumo ĉerkas.

REUTAOJ

Mia peniko
samdelikatas hajke
al ŝprucpisto
grafite al trajnmuro.
Nu, ne por mi ĉi skolo!...

(Kaj la titolo?
Kie la nud-narkoto?
Vi ĝin ne trovos!
Mi ja nek G. Peneter
estas, nek Miyamoto!)

III *Al la abonantoj*

Sinkron- kaj diakron-evolucie,
raŭmisme, roke, kaj mikrosocie,
minoritate-tuje, pensaj globe
kaj agaj loke, ni institucie
normigas kaj establas referencon
por nia diasporo. Aŭspicie
aŭguras ni la onton de l' movado,
kaj pioniras ni rezolucie.
Eĉ se fojfoje ni, nu, esoteras,
aŭ vortkapricas tro erudicie,
tamen nin fidu! Ni konscias taskon,
kaj ĝustavoĵas ni navigacie.

Do pluabonu tiun ĉi gazeton:
ni ĝin plibonigadas sensacie!
(Ni danku ĉi-okaze al UEA
kiu nin multe helpas subvencie.)
For praelanoj! Novan strategion!

Silfer!!!

JEN NOTO DE LA REDAKCIO.

IV

Verkhistoria komentario

Ni verkas laŭ fatflagroj tuj venontaj,
vidpovas jardudekon. Horizontaj
vintroj nin fortimigas. Verdaj laŭroj
velkiĝas frue. Blankos bukloj blondaj.

Ni fine ne transvivos! Kurzens spitis,
Kalocsay ploris kaj Miĥalski agitis,
ekse. Post ducent jaroj, kiu fosos
pri tio, kiu fuŝis, kiu spritis?

Verkas ni – en etlingvo por ethomoj,
sekve ne vundos niaj malrenomoj.
En 3000 nia sekto forgesitos,
negrave jam al vico da fantomoj.

Sed eĉ la vere grandajn tio vipas!
Ve sorto, kiu vakon anticipas...
Vi, kiuj famis tra la mondo, falos
en ombron; vi vindite jam enkriptas.

(ekz.: Mi ŝatas kantistinon sen komparo,
nudigas ŝi animon per voĉklaro.
Ŝi trance ravas min.

Kaj iam mortos.

Kiel mi aŭdu ŝin sen ĉi amaro?)

...Kaj ĉu ne anstataŭe
alrajdos helpe mil pli bonaj?
Se artis ni antaŭe,
ĉu poste iĝos monotonaj?
Ni grandan klanon anas
da mesaĝintaj milionoj,
kaj nia vok' ne vanas,
ĉar enretigas ĝin tempfugaj tonoj.

V
Prototipa Recenzo
por kontribuuntoj al ĉi tiu Rev(u)o

RECENZOJ (punkto). (BLANKA TITOLO) eld. ĉe Fonto/
 Iltis/UEA/TK/aŭtoro/ne indikita,
 198um (minimume tri-kvar jarojn
 antaŭ hodiaŭ.) (punkto kaj paragrafo). Fakte,
 en la mikrosocio esperantista verko
 ĉi tia ne tre ofte vidiĝas. La aŭtoro
 elektis temon trafan kaj aktualan/Nia
 poeto la parnason verdulan grimpis lerte/
 pri sia fako tiu aŭtoro kompetentas/
 ĉe tiaj ĉi planlingvoj nur fuŝojn oni trovas.
 Legontojn ni avertu, ke la paperkvalito
 ne estas bona, krom ke fuŝiĝis la bindiĝo.
 Da preseraroj estas malmulte/tro/torento;
 lingvaĵo estas bona/klasika/fuŝa/angla/
 nagata/piĉa/ŝulca/damnenda kaj hereza,
 kaj nin konsternas provo ekuzi formojn *anke/*
par-/ala/hik/men/aaargh!/minacegan Ido-idon.
 Mi iam enterprenis mem tian formon, tamen
 ĝi ne montriĝis bona/mi havas kopirajton/
 la aŭtoro idiotas! La verkon prideseĝnis
 trafe/humure/aĉe/neniom ajn John Hartley.
 Antaŭparole nia aŭtoro pardonpetas,
 ĉar li/ŝi/ĝi/[ne scias] nespertas. Tamen!/Ĝuste!
 Kompare al Jesuo/Freud/Marx/Sartre/Waringhien/Ché/
 Auld/Jespersen/Bach/Einstein/mia onklino Sonja
 nenion/multan novan ĉi tiu verko diras.
 Do nepre ĝin aĉetu de Libroservo aŭ de
 la eldonejo. (Pastron preĝejo nutras.) Laŭde
 ni danku la renomatan aŭtoron por denova
 riĉiĝo al la esp-a kulturo. (punkto. Altbrova
 recenzemulo aldonu:) Mi aperigos baldaŭ
 definitivan trakton ĉi-teman. (recenzhalt' aŭ
 felietono.)

PERMARAĴ KANTOJ

I

tre maro
 kiu dis kaj vast ebenas
 galimatie blua jes kaj
 etenda mejlojn
 oceane longa
 granda ĝis
 plu granda ol mi povus revoserĉi
 horizonton kiun mi
 ne enmanigos
 kaj ondosulkoj tanĝen
 al preter mondorande

tra-mar
 malgraŭ viaj flankajoj
 kverelontaj mevoj
 kajoj senŝipaj
 arda sablo ŝtona
 plaĝaj homventroj
 (kelkaj sufiĉe graciaj)
 sub la sen-ozono
 krom iom da plaŭd
 vin apenaŭ perturbas

re maro
 sen homeske limiti elĉerpend
 paca aŭ ŝaŭma sed
 nefina sol
 memeterna sol
 ĉiuma

kaj nesolida odor' je
 salo kaj genero
 nedepend viaj generaĵoj

ho vi

eg mar
 unua viv

lasta virg

II

Tri monatojn ni vojaĝas
inter ŝiphavenoj.
Flanke de la ŝipo naĝas
mevoj kaj delfenoj.
Mevoj trinkas ne bieron,
kaj delfenoj – plaŭdas.
Porpreĝante firman teron,
ni enkele raŭkas:

Ni vombatas, hoj!
en la ŝipkonvoj’;
inter pluvo kaj diluvo,
maroboj’.

Ses monatojn ni navigas
inter kontinentoj.
Ofte ni por distro ĵigas,
kantas tra la ventoj.
Ŝancelata planko saltas,
dancojn tre malhelpas.
Planko altas kaj malaltas;
naŭzo nin forĉerpas.

Nin vom’ batas, hoj!
en la ŝipkonvoj’;
inter tego kaj ferdeko,
maroboj’.

Tro monatojn jam ni vagas
for de hejmenrevo.
Malkonsole nin algrakas
grumblo de la Ĉefo.
Ni taĉmentas, taskas trupe,
pezas la laboro.
Tamen baldaŭ – kaj sendube! –
jenos promontoro...

Ni trompatas, hoj!
en la ŝipkonvoj’;
inter bordo kaj tribordo,
maroboj’.

III

Ĉe plaĝo
 naĝo
 ĉi-ien ĉerpis bebojn,
 bubojn kaj snobojn.

Sub
 nub' sane
 sunon atendas
 atletoj kaj koketoj.

Kovras korpojn
 kokose odora
 ŝirm-ŝmiro.
 Ŝerceme, ŝate
 mudlas maron vag-vento,
 defore flustra.

Ies laŭtilo
 pafpumpas bas-batadon
 tra ĉif-zefiro.

Knaboj sable saturas
 turo-fosojn. Flosojn
 luigas iu al paroj.
 Pure plaŭdas ekpaŝantinoj.
 Ronkuloj rostas – kolbasojn kaj kotletojn.

Roze kaj ruĝe
 larĝaj kovriloj lanaj
 kuŝas; kaj bronza
 talioj sur la lano;
 tiklemo ĉe talioj.

Mi kaj dosiero
 en arb-ombra observo.
 Ĉe plaĝo
 naĝo
 gregigis grupon buban,
 beban, snoban,
 dispompe aplomban.

NOKTURNO

Griloj gegrincas
ie en la nigro.
Koloŝvito. Kuloj orbitas pri
la
lampo prilumas pale
la ĉambron vaka.
Silento prema timpanon.
Klaka.
Estas
post la unua.
Dormas razen' sterila.

Konkreto kuŝas;
sub izolecaj lantern-
fostoj. Fenestras lumo
en nenion.
Televido mallaŭtas -
ion pri Nikaragvo?
Dormas nefermokule. Anim
-malflagro.

Obtuza malhelo
densiĝas en la
kranion.

EKTUSAS MORTO

Ektusas Morto, kaj
ŝtoniĝas ĉio;

kvankam aktuale
ni ne timas lian plagon.
Konas ni detale
la fetoran ledan jakon,
kaj per rustaj radoj
lian muĝan motorciklon.

Novajn kamaradojn
li akiras, novan viglon.
Nun li amas blufi
per ostrompaj malhumanoj,
kaj fe-polvon snufi
kun la belaj mondumanoj;

plu havante malskrupulon
por forfrapi kadukulon.

Plu la nigra kavaliro,
malgraŭ ŝikfasado.

Kie iam varmis homa spiro,
neŝanĝebla esthiato.

NASKIĜTAGA POEMO: '90

I

Malantaŭe nemulto, antaŭe
nenio. Mi ne vivovojas; mi diskugliĝas,
brikojn trapafas kaj resaltas pavime,
sen evidenta libera volo.

Foje mi trafas karnon,
foje oston.

Ne ŝatas mian eston.

Ne povas diveni la estron.

Buliĝe ŝirmas dis atak la ventron.

II

Mi staras en la vento
ĉi lastajn jarojn.
Vento duŝis
haŭton raspiĝantan,
molon forskrapis,
kirlis je la verto.
Min ŝovblovis la vento.

Vi - foriris,
penaĝiĝis,
faris, karis,
fojfoje revenas,
kontroli ĉu -

jes, kara, mi ĉiam restas
ĉi-loke.
Tute ne miru.

Jes, kara, ĉiam mi restas
tie ĉi,
senvoke.

III

Senvole flankenmetis
min oni sole
kaj mi spektas paradojn
de alies armeoj.

Sloganoj skandigas la retinon.
Mil vivteloj konkuris tratarae
ke aligu unu dupon.

– Nenies pravon mi konas,
sed parkeras malpravon propran.

Arduloj dandas de idealada daltonismo.

– Se mi streĉus eĉ la malgrandan fingron,
mi povus ŝanĝi la mondon – morgaŭ.
Sed mi ne streĉos.

Ŝrikaj virinoj perpugnas empation.

– Mi maljustis kontraŭ vi;
sed mia vivomoro statas elmuldita, satas rigida;
rigida ĵelee.

IV

Ridigaj je-lege
miaj plendoj laŭ konato.
Mi troigis.

Estas nek kuglo, nek ventomontrilo, nek militafera raportisto,
nek eĉ kompetenta homanto.
Estas ulo, postlasanta malkontentigojn,
trompitajn atendojn.

Mi pardonpetus,
se mi pretus.

Mi multe malestimis
kaj malgrandanimis,
kaj ofte timis. Mi penis,
sed la pretekstoj – ne rimas.

Kaj io ŝiras, io skleras,
io premas gorĝe.
Io baptas al mi la sangon.

Kaj mi ignoros post iom.
Ĉar lumos morgaŭ
nova tago
kaj montros
malantaŭe nemulton,
antaŭe
nenion.

DEK STURMOJ

I

Denove lafo lavangu,
ankoraŭfoje la vulkano sangu.

La venenpluvo plagu;
ĝi laŭmerite punu la nekulpajn,
kaj sufoku la justulojn.
Ni faris niajn postulojn,
ĝisbatigis niajn stilojn,
verdiktis. Plufoje vepulvo flagru;
kaj flagras.

Ĝin jam nenio estingos.
Laŭmerite puno la virtulojn disklingos.

Ĉi ĉio spektras
dum mi spektas.

II

Se eblus juĝo
dum buĉo
kaj peso
malgraŭ leĝoĉeso,

invadat-iano ne pli valorus
ol -ant-iano, aŭ bomb-ato,
ol -aplaŭdanto;
(nek malpli!)

Kaj ne temus pri herooj
aŭ hitleroj: ĉiu havas sian pravon,
ĉiuj dividas mortotimon.

Kaj la satrapo faris malbonon,
faligis sur sian popolon malbenon,
ni lin maldankas. Kontraŭstaro necesis,
kondamno justa decis.

Sed ne eblas juĝo
dum puĉo
aŭ peso
dum renverso,

kaj la morto de unu
kontraŭ alies morto oportunu.

III

Jam morgaŭ venos Morto en vian antaŭkorton
malgraŭ via sidiĝo protesta, malgraŭ aŭto-
kornoj aprobaj, malgraŭ standardoj, malgraŭ laŭto,
malgraŭ kuniĝo – venos. Jam morgaŭ venos Morto.

Vi sinceris, kantis eksmode, debatis, prezentis kialojn
laŭ partio, ĝojis pro politika gajno.
Ĝojis, dum morgaŭ venos Morto.

Blago Bagdade
Blago Vaŝingtone,
kaj mi suspektas, ke blago ĉi tie.

IV

Milito venis
kiel ĝeno.
Kial ĝeno?
Ne mi vundiĝos.

Neniu, kiun
mi konas, mortos.
Neniu perfortos
mian bonfartron.

Ĉu ĝi unikos?
Ĉu ĝi eĉ novas?
Kiel do povas
ĝi min agaci?

Superegoo
ofendiĝema.
Obsedo ĝema
pri amasbuĉoj.

Sulkoj malgravaj
 en ies psiko
 kiujn tragiko
 glate forglados.

Okulangule
 dolorcisterno
 jam dum eterno
 lika verŝonte.

V

Ho Dio ŝiru mia koron,
 Ho Dio disponardu mian sternumon,
 bot-al-pulme. Se mi ne ploros,
 Ho Dio eltranĉu larmojn per razilo.

Ie iu ploras
 ĉe sia mondo fino raketbrila.
 Se mi arogas homecon,
 Ho Dio min kunplorigu.

VI

Ŝtorme ŝtormŝtorme
 Arboj disdisŝiritaj
 profajroforne.

Sturme sturmsturme
 Homostoj krevbatataj
 Sangŝprucos ĉure.

Hak kverko falu
 Hak kruro Hak brak manplen-
 -i de viscere

viskoz kaj viŝ kaj
 vind post vund kaj volv vom vor
 vevoĉ kaj vaku'

VII

Belulinojn flegu,
 ili estas doto.
 Por ili endas dorloto.
 Ili belas; ni gapas.

ĉe ili ni nur knabas.
 Ili katenas; ni sklavas.
 Ili ŝaltas; ni bavas.

Kaj kiam ni venkas
 eluzu bone tiujn ĉurujojn.
 Ilin katenu ĝis bavons sangon,
 trafortu ĉiel; honoron al ili vi faras.
 Skrapu la vulvojn, knaboj,
 mordu la mamojn, ungumu la pugojn—
 kian alian utilon ili havas?
 Ĝis kadavrigo; poste ili fekundos
 entere.

La hundoj bojas flarinte karnon;
 kiu bravas haltigi ilian gloradon?!

VIII

Al la bataloj
 kaj kadavroraportoj
 Ni kutimiĝos,
 Ĝi kutimos.
 Ni nul timos.
 Ĝi eĉ ektedos.
 Bombo karnon knedas?
 Ŝanĝu televidkanalon,
 mi petas.

IX

La brulintaj aŭtoskeletoj
 en la senhoma ŝoseo
 nenion atestas,
 ĉu ventas aŭ kvietas.

Oni ligis sur palisoj
 kaj amaspafis.
 Ankaŭ tio nenion atestas.

Fajro ĉielen kaj graso mare
 kaj mallumo tagmeze.
 Ne, tio ne antaŭsignas ajn,
 tio ne troviĝas sur apokalipsa rulteksto.

Hundo malsata nigra bojas (voĉo en la dezerto)
dum kapitulacanto kisas manojn
ka la kameraistoj pluiras
kaj la tankoj pluveturiĝas
kaj la hundo plu bojas
ĉar ĝi ne bezonas ateston.

X

Kiam venĝe oni ellitiĝos en Bagdado
kaj venĝe oni laborejen en Amman
kaj venĝe oni instruistos en Rijad
kaj venĝe oni preĝos en Telavivo
kaj venĝe oni maldormas en Gaza
kaj venĝe oni spektas en Novjorko
kaj venĝe oni memoras en Nikosio
montriĝos ripete, ke
nenio por gajn'
nenio en fajn'
nenio laŭ ŝajn'
nenio *is mine*
nenio *ist dein*
nenio pro nenio
nenio
nenio por nenio ajn.

NOTOJ

La poemoj aperas laŭ ordo de verkiĝo; la lastan poemon, *Dek Sturmoj*, mi verkis ĵus post la Unua Gofa Milito, do januare de 1991.

Ritaro: La latina poemo estas himno fare de Sankta Kolumba, irlandano de la 6a jarcento. Ĝi anticipas la pli faman *Dies Irae* de la malfrua mezepoko, sed aludas pli pri kompato en sia fino:

*De la Reĝo de la Reĝoj plej justa
proksimas la tago de la Sinjoro.
Tago de kolero kaj de venĝo,
de ombroj kaj de nuboj,
de tondroj fortaj,
[tago] krome de angoro,
de doloro [kaj malĝojo,]
en kiu ĉesos la virina
amo kaj sopiro,
kaj la homa kverelado
de ĉi tiu mondo kaj deziro.*

Hopkins Heroldas: Gerard Manley Hopkins, angla poeto de la 19a jarcento, kun siatempe revolucia maniero pri metriko kaj metaforo, anticipinte plurarilate la ennovigojn de modernismo. *ínskejp'* (inscape), kvazaŭe "intern-pejzaĝo," estas la esenco de ĉiu aĵo, rivelanta ĝian individuan belon.

Naskiĝtaga poemo: '88. "Dolĉe Dekses" (Sweet Sixteen) – kutima frazo pri la deksesjaraĝiĝo en la anglalingvano. "Prufrock-i" – aludo al la poemo de T.S. Eliot, *La amkanto de J. Alfred Prufrock*, klasika prezento de la frustrado de neagemo pri amoro.

Greka Balo: Liro kai liuto estas kretaj folkloraj instrumentoj; la liro estas speco de violono ludata surgenue. La kretaj dancoj estas *sirtós* ("trenata"), *sústa* ("risorto"), *pidiĥtós* ("saltata"), kaj *pentozális* ("kvinpaŝa"); la rizítikos estas sendanca heroa kanto. *Ciftetélis* estas para danco de mezorienta origino; *Kalamatjanós* estas septakta grupa danco el la greka duoninsulo. Hebe estis la helena diino de juneco.

Frustrita Menso: "Aliaj faris, kaj eĉ se revenis...": cito el alia mia poemo ne inkluzivita: "...nenion povas diri al vi plu."

Alarmo: La temo estas ĉiam aktuala, sed la preteksto estis la protestoj pri la apero de la filmo *La Lasta Tendo de Kristo*.

Kanzono: "Jam vidis kaj volis...": denove cito el poemo mia elĵetita.

Kristnaska Evaluu: Dickens-novelo: *Kristnaska Rakonto*, de Charles Dickens, plurfoje surtelevidigata diversforme dum kristnasko en la anglalingva mondo. *Gloria... Et in terra pax*: la latina versio de la anĝelolaŭdo: “Gloro al Dio en la supera alto, kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro.” (Luko 2:14)

Ekzegezi Monumentumon: Parodio de la poemo de Horacio: “Mi verkis monumenton pli daŭreman ol bronzo, kaj pli grandan ol la reĝa strukturo de la Piramidoj, kiun nek la ferocaj pluvoj nek la senpotenca nordvento kapablos detru, nek la nenombrebla jarsinsekvo kaj fuĝo de epokoj.” Alcuin: poeto kaj edukisto en la kortego de Karlo la Granda. Kvankam anglo (de Jorko), li malŝatis bieron.

Kiu Klare Aludas: La aludo, kompreneble, estas al la okazaĵoj en la Placo Tienanmen.

Ekzercoj por Bert: Du ekzercoj laŭ peto de samlerneĵano Bert Thompson: moduliĝo de ordo en malordon kaj inversen; kaj moduliĝo de malordo en ordon kaj inversen.

La Murego: Kompreneble rilata al la falo de la Berlina Muro (kaj la albumo *La Muro* de Pink Floyd). “Miojn ĉiam devas bari...”: el *Rond(el)ire*, supre.

La Niĉja Literatura Rev(u)o. Aludo al la *Nica Literatura Revuo* de Gaston Waringhien. *pedicabo vos et irrumabo*: “mi vin bugros kaj midzigos” – el la fifama satiro de Katulo (16). “nam cij fuŝstiles ak baj sprahŝo skuras”: parodio – sed ne tro – de la praga skolo: “ĉar (latina) vi (ci-oj) fuŝstiladis (praesperanto) kaj (latina) per (angla) lingvo (germana) obskuris (mallongigo).” La “pedantopapo” estas kompreneble Rikardo Ŝulc, kaj Kálmán estas Kalocsay. *Nam caram linguam...*: “ĉar mi la karan lingvon disigos firme preter tiuj kiuj la vortojn ne konas per la buŝo.” *Al la abonantoj* paŭzas almenaŭ iomete la tendencojn de *Literatura Foiro*.